# Jura Semajno

Semajna bulteno de Internacia Jurista Esperanto-Asocio

Januaro : 4 2022

## FRANCIO APROBAS LA DEVIGAN UZON DE LA PAŜPORTO "KOVIM-19"

La franca parlamento ĵus aprobis, ke estos necese disponi la, tiel nomatan, "Paŝporton Kovim-19", se oni deziras eniri en kelkajn lokojn aŭ uzi publikajn servojn. Tiel, malpliiĝos la socia vivo de tiuj, kiuj ne deziras ricevi vakcinadon kontraŭ tiu epidemio. La celo de la nova leĝo estas malkreskigi la nombron da tiuj civitanoj kiuj ne deziras esti vakcinitaj. Nuntempe, pli ol 5 milionoj da francoj rifuzas tiujn vakcinojn.

La Nacia Asembleo aprobis, kun 215 poraj voĉoj, 58 kontraŭaj kaj 7 sindetenoj, tiun novan leĝon. Ĝuste antaŭ la diskuto pri la nova normo en la parlamento, la franca Prezidento Emmanuel Macron deklaris, okaze de ĵurnal-intervjuo, ke li deziras ĉagreni tiujn, kiuj ne deziras ricevi la vakcinadon. Tiu deklaro kaŭzis grandan perturbon en la franca socio.

Ĉi tiu nova leĝo anstataŭigas alian normon, laŭ kiu testo, realigita ĝuste antaŭ la uzo de publika servo aŭ la eniro en lokon kie amasiĝas homoj, jam estis sufiĉa dokumento por kiu ajn.

La Ministro pri Publika Sano sciigis, ke pere de ĉi tiu nova paŝporto Francio havigas al si mem novan ilon, kiu celas protekti la civitanaron. Tamen, socialistaj deputitoj anoncis, ke oni prezentos al Konstitucia Tribunalo apelacion por garantii fundamentajn rajtojn. Tio sendube prokrastigos la ekvalidigon de la nova leĝo.




Dank'al ĉi tiu nova deviga dokumento, francoj rajtos eniri en publikajn lokojn, kiel kinejojn, teatrojn, muzeojn, ktp. Same, estos eble eniri en restoraciojn, sportejojn kaj eĉ uzi longdistancajn trajnojn. La nova normo antaŭvidas, ke la falsigo de la paŝporto estos punita per 75.000 eŭroj, kaj eĉ kvinjara malliberigo. Tamen, tiuj punoj povus esti nuligitaj se oni ricevas vakcinon antaŭ 30 tagoj.

# Vorto de la Semajno

**Akcepti:** 1) Konsenti ricevi ion, kion iu donas aŭ proponas.
2) Konsenti pri tio, aprobe allasi.
3) Devontigi sin pagi.

- *La homo kiu trovis mian perditan hundon akceptis monon kiel rekompencon.*
- *La Parlamento akceptis amendojn al kelkaj artikoloj de la Konstitucio.*
- *Kutimo estas ĝenerala praktiko akceptita kiel juro.*
- *La deklaracio estis unuanime akceptita de la partoprenantoj.*
- *La Ĝenerala Asembleo de Unuiĝintaj Nacioj akceptis la Konvencion pri Genocido en la jaro 1948.*
- *La laborplano akceptita okaze de la lasta kongreso ekrealiĝos post kelkaj jaroj.*
- *La Civila Kodo estis akceptita la 11-an de junio 1964.*
- *Tiu peto estas neakceptebla kondiĉo.*
- *La ĉeestantoj malakceptis la proponon.*
- *Proponita leĝo estis akceptita per absolutaj plimultoj de ambaŭ ĉambroj.*

**Akcepto de kambio:** ago, per kiu la tratato subskribas sur la kambio deklaron, ke li plenumos la pagordonon faritan de la tratanto.

